# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo marto 2019**


## TAGO DE POEZIO

En marto, la 21an, oni celebros la Tagon de Poezio, kaj estas antaŭvidataj almenaŭ du okazaĵoj en kiuj Esperanto havos rolon en Madrido.

La 21an mem la Universitato Complutense omaĝos grandan poeton, la katalunan Joan Margarit, per libro kolektanta liajn poemojn en pluraj lingvoj, inter kiuj la internacia. La libro titoliĝos "Margarit Universal", kaj enhavos unu poemon tradukitan al Esperanto, tiun nomatan “Monumento al la mortintoj de la korea milito”, tradukitan de Jorge Camacho, kiu aperis antaŭe kun aliaj verkoj de Margarit en la literatura revuo Beletra Almanako. La libron oni prezentos la 21an de marto, je la 12a matene, en la Fakultato de Filologio de la madrida Universidad Complutense, kaj oni antaŭvidas la deklamadon de pluraj poemoj, inklude de tiu en Esperanto.




Ankaŭ okaze de la Tago de Poezio, la 23an de marto okazos omaĝo al la forpasinta poeto José Agustín Goytisolo, en la 20a datreveno de lia morto, en kiu partoprenos lia tradukinto al Esperanto, Miguel Fernández. Ĝin organizas Radio Utopía, je la 12a horo, en la avenuo Somosierra de San Sebastián de los Reyes. Aliaj konkretaj informoj aperas en la apuda afiŝo.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La venontan sabaton, 2an de marto, la kutima babilrondo okazos en nova proponita loko (ĉar en la antaŭa estis tro da bruo). Temas pri la Taberna de Ángel Sierra, en la stratangulo inter stratoj Gravina kaj San Gregorio, metroo Chueca. Ni renkontiĝos tie ekde la kvina.

## HISPANA KONGRESO EN MALAGO

Memoru ke la Hispana Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en la ponto de la 1a de majo, en Malago, kune kun la Andaluza Kongreso, kaj parte koincide kun la kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF). Jam pluraj madridanoj aliĝis al la *Trikongreso*.

Oni anoncis la okazigon de oficialaj KER-ekzamenoj, kun la ĉeesto de Katalin Kováts. Ankaŭ venos Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu prelegos pri la ĉeftemo “Lingva situacio en Eŭropa Unio”. La turisma programo estas tre abunda, kun vizito ne nur al andaluzaj urboj, sed ankaŭ al la nordo de Maroko, en la lastaj tagoj.

Tiuj kaj aliaj informoj aperas en la oficiala retejo: http://esperanto-andalucia.info/, kie ankaŭ eblas aliĝi al iu ajn el tiuj kongresoj.

Memoru ankaŭ ke la Universala Kongreso 2019 (laŭnumere la 104) okazos en la finnlanda urbo Lahtio, inter la 20a kaj 27a de julio. La 75a Internacia Junulara Kongreso estos festata en Slovakio inter la 28a de julio kaj 4a de aŭgusto. Kaj fine kaj pli proksime, la 92 SAT-kongreso disvolviĝos en Barcelono de la 4a ĝis 11a de aŭgusto. Skribu al ni se vi deziras pliajn informojn kaj kontaktadresojn.

## VIZITIS NIN

Dum la semajnfino de la 8a kaj 9a de februaro vizitis Madridon la brazila juna esperantisto Karina Oliveira, kiu jam antaŭe vizitis la urbon dum la julia kongreso. Ŝi renkontiĝis kun pluraj amikoj kaj vizitis la sidejon.

Luis Obando, el Kolombio, pasigis plurajn tagojn en Madrido, post sia ĉeesto en Eŭropo. Li vizitis la sidejon kaj partoprenis la lundan babiladon de la 18a de februaro (vidu apudan foton, en kiu aperas kelkaj partoprenantoj de la tiutaga babilado)



## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Pri la unuasabata renkontiĝo, atentu la modifon ĵus menciita pri la loko.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com